

# LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen  
i Sverige

Utgiven av Förlagsföreningen  
Esperanto u. p. a.

OFICIALA ORGANO POR SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO (S. E. F.)

11a Jaro  
N:o 6

Redaktör: HENNING HALLDOR.  
Ansvarig utgivare: W. WAHLUND.  
Prenumerationspris: Helt år kr. 3:50.  
Lösnummerpris: 35 öre.  
Annonspris: 10 öre pr mm.  
Redaktionens och expeditionens adress  
Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

Redaktanto: HENNING HALLDOR.  
Responda Eldonanto: W. WAHLUND.  
Abonprezo eksterlanden: sv. kr. 4:50.  
Prezo po numero: 35 oeroj.  
Anneprezo: 10 oeroj po milimetro.  
Adreso de redakto kaj ekspedejo:  
Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo.

Junio  
1923

## La jarkunveno de S. E. F.

Sabate la 19-an de majo komenciĝis la jarkunveno de S. E. F. La prezidanto de la Grupo esperantista de Stockholm kaj samtempe la honora prezidanto de nia federacio s-ro P. Nylén salutis la alvenintojn.

Prezidanto de la kunveno oni elektis s-ron Nylén kaj dua prezidanto s-ron S. Jansson. Sekretario oni elektis s-ron R. Pehrsson kaj dua sekretario s-ron H. Halldor.

S-ro P. Nylén faris paroladon pri "la stato de Esperanto ĝuste nun". Li menciis inter alie la decidon de albana registaro enkonduki Esperanton en la lernejoj kiel fakultativan temon kaj la esperantokursojn en Wien dum la pasinta vintro kun ĝiaj pli ol 2,000 partoprenantoj.

La unua vespero estis dediĉita al amuzigo. En la restoracio Gillet la samideanoj kolektiĝis je la 7-a horo. Anoj de la stokholma grupo ludis bonhumoran teatraĵon nomitan "Aventuroj en Japanujo". Poste sekvis muziko de nia hungara samideanino Ilona von Regeczy, kiu estis forte aplaudata.

Nun venis eble la kulmo de la festeno, kiam kantis la himnon laŭ la nova melodio la operakantisto s-ro Folke Andersson kun akompanludo de la komponinto mem, s-ro Gösta Jahn. S-ro Andersson devis dufoje kanti la himnon kaj la aŭskultantoj forte aplaudis.

Ricevinte nutraĵon por la animo oni pripenis ankaŭ la korpan nutraĵon en la sama bona maniero manĝante bongustan kaj riĉan vespermanĝon. Post la manĝo sekvis kaf-trinkado ktp., kanto de f-ino Haglund kaj dancado ĝis la 1-a horo.

Dimanĉe komenciĝis la kunsido je 10.30. La raporto de la estraro kaj la gazetara servo estis legataj kaj aprobataj.

S-ro Eriksson, Ludvika, proponis diskuton pri la temo "kiel ricevi taŭgajn instruantojn en Esperanto?" Oni devus aranĝi en diversaj lokoj kursojn por instruantoj gvidotajn de lerta esperantisto. Oni akcentis la urĝecon interesigi la instruistojn, sed aliaj montris la malfacilaĵojn tiurilatajn.

Oni komisiis al la estraro kaj s-roj Nils Nordlund kaj S. Jansson atenti tiun ĉi demandon.

Fraŭlino M. Noll el Kopenhago, kiu partoprenis la internacian vegetaran kongreson, venis por saluti la svedajn esperantistojn kaj ŝi rakontis pri sia agado inter la vegetaranoj.

Post maten(aŭ tag-)manĝo s-ro Carl Ohlsson paroladis pri "la interna historio de Esperanto", kiu parolado enhavis multon interesan, sed kiun ni ne povas citi tie ĉi.

S-ro A. Ågren, Eskilstuna, proponis malaltigon de la prezo de La Espero por ke oni povu pli multe vendi. Post kelka diskutado oni tamen malaprobis la proponojn faritajn dum la diskutado ĉar oni opiniis, ke ŝanĝo de la prezo nepre kaŭzigos al la eldonanto pli grandan malgajnon.

Lunde okazis la lasta kunsido je la 11-a horo. Alvenis rusa partoprenanto en la vegetara kongreso s-ro Anofrijev kaj salutis nin. Li petis, ke ni delegu kelkajn personojn, kiuj iros al la vegetara kongreso por atentigi ĝiajn partoprenantojn pri Esperanto, ĉar ili estis tuj diskutontaj pri la lingva kaj la gazeta demandoj. Oni elektis s-rojn S. Jansson, C. Ohlsson kaj L. Tell. Je la alveno de la delegitaro al la vegetara kongreso ĝi tuj anoncis sin al ĝia prezidanto, kiu tamen montris grandan mankon je ĝentileco ne donante al la delegitoj okazon paroli. Tion oni tute ne atendis de gvidanto de tia movado kia estas la vegetara.

La raporto de la reviziintoj estis legata kaj la estraro ricevis plenan deŝarĝon. Oni decidis ne elekti prezidanton sed funkciojn ĝis proksima jarkunveno la honora prezidanto kiel efektiva prezidanto. Kasisto oni reelektis s-ron Ad. Larson kaj anstataŭantoj s-roj M. Eriksson kaj S. Jansson. Reviziintoj estis elektataj s-ro L. Tell kaj f-ino H. Hemberg kun s-ro Carl Ohlsson kiel anstataŭanto.

Funkciigantojn de la gazetara servo oni ne elektis.

La elekto de reprezentanto de la federacio ĉe la kongreso en Nürnberg estis komisiita al la estraro.

La kunsido decidis por unu jaro plilongigi la ekzistadon de la ekzamena konsilantaro.

Post la fino de la kunsido sekvis ekskurso al Skuru kun komuna manĝo ĉe Björknäs. Fine kelkaj vojaĝis al Saltsjöbaden, sed aliaj vespere forvojaĝis de la urbo al siaj hejmlokoj.

En la kunveno, la ĉambrego de la Beskova lernejo, estis aranĝata ekspozicio de esperanta literaturo, lernolibroj kaj vortaroj esperantaj en diversaj lingvoj, gazetoj ktp.

Ekzameno en Esperanto okazis je la unua fojo ĉe tiu ĉi jarkunveno. Ĝi komencis jam sabate je la 1-a horo kaj ĝi ne finis antaŭ ol lunde je la 3-a. Pri la rezultato donas la ekzamena konsilantaro specialan raporton. Precipante laŭdon oni tamen devas doni al niaj tri blindaj samideanoj, kiuj faris la superan ekzamenon kaj montris sin posedi bonajn sciigojn en nia lingvo.

La ekzameno vekis ĉe multaj personoj intereson, kaj oni rajtas esperi ke ĝi ne nur devigos la samideanojn perfektigi sed



ankaŭ estos varbilo. Ni do esperu pli multnombrian partoprenon proksiman jaron!  
H.

## La jarkunveno de Eldona Societo Esperanto s. p. r.

okazis en la Beskowa lernejo lunde la 21-an de majo kun komencigo je la 10-a a. t.

Reprezentataj estis 276 akcioj. Prezidento oni elektis s-ron H. Halldor, kiu antaŭlegis la raporton de la estraro pri sia agado dum la jaro 1922. Oni povis rimarki, diris la estraro, dum la lasta parto de la jaro malpligrandiganta acetemo. Krom tio la elspezoj estis neordinare grandaj, kial la rezultato estis malgajno de kronoj 623:79. De la antaŭa jaro estis salditaj kr. 523:03, la reston la estraro proponis konduki en novan kalkulon. Dum sia 5-jara ekzistado la societo vendis librojn por 27,000 kr. Venditaj estas interalie 7,500 lernolibroj kaj vortaroj. La tutan malgajnon kaj ankoraŭ pli kaŭzigis la gazeto. Kelkaj miloj da specimenaj numeroj estis senpage dissenditaj, kial ĝia valoro kiel propagandilo estis granda. Dum la lasta tempo la societo eldonis la novan broŝuron "Nationernas förbund om Esperanto som internationellt hjälpspråk", kiu estas la plej valora propagandilo kiun ni jam havis.

Laa la propono de la reviziintoj la estraro ricevis plenan deŝargon.

Honorarioj por la estonta jaro oni decidis la samajn kiel antaŭe. (De la honorarioj pli frue deciditaj la estraranoj ankoraŭ nenion ricevis.)

Estrarano oni reelektis la eksiganton, s-ro R. Pehrsson. Revizianto estis elektataj s-roj Carl Ohlsson kaj N. Holmberg kun f-ino N. Hemberg kiel anstataŭanto.

Petante la helpon de ĉiuj por vivteni la esperantan movadon en nia lando, la prezidanto fermis la kunvenon.

## Från examensnämnden.

Vid vårens Esperantoexamina ha följande examinator godkänts:

I den högre examen: Hans Andersson, Werner Ljunggren och Nils Nilsson, samtliga med kursledarkompetens.

I den lägre examen: Nanny Asplund, K. A. Karlsten, Fritz Lindén, P. E. Lundin, Sigrid Wallenström samt följande Beskowiter: Gunnar Alson, Malte Astor, Birger Gerdman, Fredrik Haagberg, Arne Lenner, Curt Lindqvist, Martin Magaliff, Arne Pott, Harry Ramberg, Hjalmar Reuter-crona, Sven E:son Uggla, vartill kommar Karl-Erik Jansson och John Olin som vilkorligt godkänts.

Å examensnämndens vägnar:

Sam Jansson.

Examenstexterna komma att tryckas i La Espero, varjämte vissa erfarenheter rörande examen efterhand komma att offentliggöras till ledning och lärdom för intresserade.

Betyg komma att utsändas så snart vederbörliga blanketter hunnit tryckas.

**Har du läst "Nationernas Förbund om Esperanto"? Varom icke så rekvirera omedelbart! 50 öre.**

## Några erinringar angående resan till esperantokongressen i Nürnberg 2—8 Aug. 1923.

Kongressavgiften är för svenskar 15 kr. Den förut annonserade förhöjningen av 50 procent efter 1 juni träder icke i kraft. Någon rabatt för familjemedlemmar med-gives icke i år.

Viseringen av pass till Tyskland kostar för enkel resa 14 kronor. Det kan hända att rabatt kommer att beviljas på detta, men ingenting är ännu känt därom. För Bayern tillkommer sedan extra avgift på den plats där man vistas, vilken dock reducerats till fjärdedelen av den vanliga eller 5 kr. för svenskar, räknat för 3 veckors vistelse.

Pass uttages först hos den svenska myndigheten — länsstyrelsen, poliskammaren etc.

Visum till Tyska Republiken erhålles å tyska konsulatet i Stockholm och Göteborg, dit passen kunna insändas pr post. För att erhålla visum är det tillräckligt att uppgiva, att man skall besöka esperantokongressen i Nürnberg. För att styrka detta kan kongresskortet medsändas. För att erhålla visum till Bayern fordras tillåtelse av poliskammaren i den stad dit man först skall resa, men skall förbundsstyrelsen söka ordna saken, så att hänvändelse dit icke behöver göras.

Resan från Stockholm till Nürnberg kostar ca 47—48 kronor, beräknat för tredje klass inom Sverige och andra klass i Tyskland. Härtill kommer sovavgiften med kronor 6:—.

Levnadskostnaderna i Tyskland växla från dag till dag och kongresskommittén har icke själv kunnat uppgiva några siffror. Med det sista markfallet är naturligtvis en oerhörd prisstegring att förutse, i varje fall torde dock vistelsen för svenskarna bliva relativt billig. Med alla största sparsamhet torde 200 kronor exklusive kongress- och passavgifterna men inklusive resekostnaderna vara tillräckligt. Svenska sedlar böra medföras och växlas vid behov, endast en summa medföres i tyska mark för första dagens utgifter tills man hinner växla.

Någon karavan kommer förbundet troligen icke att anordna, emedan ingen kunnat åtaga sig ledarskapet. Deltagarna komma dock med största sannolikhet att träffas på tåget, enär resan väl av de flesta påbörjas samma dag. En del finska esperantister komma möjligen att taga vägen genom Sverige och samtidigt besöka Göteborg med utställningen.

Från Berlin till Nürnberg ha Berlin-esperantisterna reserverat vagnar. Priset är 4 sv. kr., som före 10 juli skall vara hr Max Blankenheim, adr. Stuberauchplatz 5, Berlin-Steglitz, tillhanda. Tåget går från Berlin 1 aug. kl. 10 f. m.

Hr Max Blankenheim har förklarat sig villig att anskaffa rum i Berlin åt de genomresande svenska esperantisterna om han blott i tid blir underrättad om ankomsten. Därvid bör uppgivas om privat- eller hotellrum önskas och hur pass stora anspråk man har.

Hr Ernst Andersson, Eriksfält, Kulladal (vid Malmö) har lovat att om han får tillfälle att resa skall han tjänstgöra som färdledare.

## Sveda kroniko.

**Nia dekkvina.** Sin anoncis al la kongreso en Nürnberg f-ino Elli Ahlström, Stockholm, Otto Roesel, Borås, Ernst Andersson, Lennart Lundell oeh Frans Lövgren, Malmö, f-inoj Anna Karlsson kaj Anna Landen(?), Gävle, Sonja Forsberg, Strömsbro, kaj s-ro Herman Stahre, Gävle.

**Stokholmo.** Nian urbon vizitis rusa samideano loĝanta en Estonujo, s-ro Anofrijev. Li partopre:is la internacian vegetaran kongreson dum pentekosto sed restis poste dum du semajnoj. La 25-an de majo estis aranĝata konversacia vespero en la restoracio Djurgårdsbrunn, kie ĉeestis krom s-ro Anofrijev nia samideano redaktoro Odegård el Hudiksvall. S-ro A. parolis pri siaj spertoj de lingva studado kaj komparis la laboron necesan por lerni ekz. la germanan lingvon kun la laboro necesa por lerni Esperanton.

S-ro A. estas tre vigla kaj energia homo. Dum sia restado en Stokholmo li vizitis multajn eminentajn personojn, kaj ĉie li propagandis nian lingvon.

Nia angla samideano F. W. Hipsley, kiu alvenis antaŭ duona jaro, forlasis nian landon kaj reveturis Anglujon. H.

**Gevle.** Ĉe la teknika vesperlernejo okazis ekzameno la 2-an de junio sub gvidado de d-ro Mauritz Sterner. La lernantoj tradukis parole kaj skribe tekstojn el Esperanto en svedan lingvon kaj returne. La rezultato estis bona, evidente ne estis eble atingi la saman rezultaton en alia lingvo.

La ekzamenon finis per mallonga parolado de pastro Törnqvist, kiu ankaŭ diskonis kelkajn monajn premiojn al la lernantoj.

Gvidanto de la kurso estis s-ro J. Helsing.

**Malmö.** La unua somerkunveno de la klubo esp. en Malmö okazis la 29-an de majo. Post kolektiĝo ĉe la muzeo je la 8-a vespere oni promenis al la bela kafgardeno Johannelund, kie la vespero en la plej agraba maniero estis pasata per komuna kaftrinkado, parolado kaj kantado en nia lingvo.

S-ro fil. mag. J. Pettersson paroladis pri "Nürnberg, la estonta mondkongresurbo", deklamis s-roj M. Carlsson kaj E. Svensson kaj kantis s-ro K. Osterholm.

## I Svenska Morgonbladet

skriver recensenten vid vegetariska kongresen, som hölls under pingsten, bl. a. följande:

"I förbigående sagt blir man ivrig anhängare av tanken på ett internationellt hjälpspråk, när man stuttit ett par dagar på en dylik världskongress och tröttat örat med allehanda tungomål. Visst tolkades anförandena emellanåt, men hur mycken tid och kraft föspilldes ej härpä, och hur mycket större skulle ej behållningen bli för alla deltagare, om de redan i skolan hade lärt sig att hjälpligt tala och skriva esperanto eller ido! De internationella folkrörelserna komma till sist att framtinga ett mellanfolkligt hjälpspråk, och det är bara underligt vilket minimalt intresse denna sak hittills tillvunnit sig i vårt land. Men så äro vi ju också "Europas bortskämda barn", om man får tro ärkebiskopen."





### Venedig-konferensen

om esperanto och affärlivet erhöj en större anslutning än väntat var. Ej mindre än 208 offentliga institutioner från alla fem världsdelarna voro representerade, däribland räknades ej mindre än 84 handelskamrar, 21 varumässor och 7 handelsministerier. Fullständig förteckning över de representerade institutionerna och föreningarna jämte redogörelse för konferensens arbete finnes i aprilnumret av Esperanto. Genève Rapport över konferensen utkommer inom kort på flera språk.

U. E. A. är värt allt erkännande för sitt initiativ och det duktiga arbete som nedlagts. Detta erkännande uttryckes bäst i en mangrann anslutning av esperantisterna till förbundet, varigenom det erhåller möjligheter att utträtta annu mera.

(Överstående)

### Danzig.

Den 2:a esperantokongressen i Danzig anordnas i år såsom efterkongress till Nürnbergskongressen. Anmälningssavgifterna äro tredjedelen av de för Nürnberg gällande. Kongressbestyrelsens adress är Esperanto-Werbeamnt, Kohlenmarkt 3.

### Indien.

I Delhi har en esperantoförening bildats av professor Gopalji.

### Japan.

På initiativ av "Tokio Asahi Sinban", en av de största dagliga tidningarna, och kejserliga pedagogiska sällskapet anordnades i det nämnda sällskapets lokaler en esperantokurs 26—31 mars. 450 deltagare anmälde sig och flera tiotal av intresserade måste dessutom nekats att delta på grund av utrymmenas otillräcklighet.

*Faru ĉiun bonon, kiun vi povas,  
per ĉiuj rimedoj, per kiuj vi povas,  
per ĉiuj manieroj, per kiuj vi povas,  
ĉiuloke, kie vi povas,  
ĉiutempe, kie vi povas,  
al ĉiuj, al kiuj vi povas,  
tiom longe, kiom vi nur povas.*

Vadim Anofrijev.

Elva, Estonujo.

## Distriktaj organizaĵoj.

Samideanoj en diversaj lokoj skribis pri fondo de distriktoj de Sveda Esperanto-Federacio por pli intime kunligi la izolajn samideanojn kaj grupojn en proksimaj lokoj, samtempe ebligante pli efikan propagandon publikan, laŭcelan edukon de la varbitoj, konservigo de la intereso kaj entuziasmo de la membroj ktp.

Ni ĉiuj scias, ke la plej multaj organizaĵoj havas distriktojn, kaj ni tre facile komprenas ke speciale por nia movado estas urĝa afero, ke la membroj renkontiĝas, alie ili malkutimiĝas je parolo de nia lingvo. La jarkunvenojn nur malmultaj povas ĉeesti pro la longaj distancoj kun altaj vojaĝkostoj. Se distrikto aranĝas unufoje en ĉiu

monato aŭ kvaronjaro kunvenon en centra loko al kiu facile povas vojaĝi la esperantistoj de la proksimeco, tio povus utili al nia movado konforme al la ĉi supraj indikoj.

Oni tamen ŝancelas je starigo de novaj organizaĵoj vidante la nekontentigan funkciadon de la jam ekzistantaj. Organizaĵformoj ne faras mem laboron, ĝi devas esti farata de la membroj, kaj oni povas antaŭvidi, ke estos la membroj jam apartenantaj al niaj vicoj de laborantoj kiuj faros ankaŭ la novan laboron. En la esperanta movado laŭŝajne oni tro multe aplikis la metodon troŝarĝigi unuopan personon por tute sukfoki lian intereson. La nepra sekvo estos, ke li post pli aŭ malpli longa tempo laciĝas kaj poste li povas esti perdita por ĉiam. Pli saĝe estas, se ĉiuj kunhelpas, tiam la laboro povas esti ĝuo anstataŭ ŝarĝo.

En provincoj kie estas sufiĉe da izolaj esperantistoj aŭ grupoj kaj inter ili entreprenemaj personoj oni fondu por propagando, perfektigo kaj konservo de la intereso distriktajn organizaĵojn, kies aferojn prizorgu komitato, sed tio ne necesigas kreon de nova perigilo inter la federacio kaj la lokaj grupoj aŭ konkurentoj kun la federacio. Niaj malgrandaj fortoj tute ne permesas al ni malkoncentrigon, sed ni devas bone pripensi la agadmanieron uzotan kaj en plej saĝa maniero labori, nur tiam ni povas esperi kontentigajn rezultatojn.

La samideanoj pripensantaj fondigon de distriktoj estas petataj komuniki la estraron de la federacio kaj ankaŭ havigi al si ties konsilojn pri la nomo, por ke neutilaj intermiksoj ne estu farotaj.

H. Halldor.

## Libroj kaj Gazetoj.

Rezencotaj libroj estu sendotaj en *du* ekz.

**La Espero**, Himno Esperantista. Poezio de D-ro L. L. Zamenhof, muziko de F. de Ménéil.

**Himno de danko**. Vortoj kaj muziko de Harrison Hill.

**La Fama Humora kanto Esperanto**. Verkita, komponita kaj kantita de Harrison Hill. Havebla ĉe Eld. Soc. Esperanto.

**La vera frataro**. Vortoj kaj muziko de Harrison Hill.

Tiuj kvar muzikaĵoj estas eldonitaj de Bri a Esperanto Asocio, kies eldonitaĵoj ĉiam estas distingitaj je bona kvalito.

**Literatura Mondo**. De tiu bonkvalita revuo aperis la majo numero. Nia samideano s-ro Nylén tradukis la belan fabelon de August Strindberg "La fabelo de Sankta Gothardo". Ni varme rekomendas la belan revuon, kiu estas havebla ĉe Eld. Societo Esperanto. Prezo po numero kronoj 0:60.

**Th. Cart: Korektoj de la eraraj Tradukoj en "Universala Vortaro"** (kun aprobo de la Lingva Komitato). Kolekto de la Akademio. Germana parto. Esperanto-Eldonejo Ellersiek & Borel G.m.b.H., Berlin. 4 paĝ., litografie presitaj, kaj kovrilo.

**Salom-Ahehem kaj Perek: Hebraj Rakontoj**. El hebraj originaloj tradukis Is. Muĉnik, membro de la Lingva Komitato. Internacia Mondliteraturo n-r 9. 78 paĝ.

kaj kovrilo. Eldonis Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo por Svedujo 0:85. La serio I. M. ricevis plenan aprobon. Tiu ĉi libro estas vere interesa, ĝi prezentas du verkistojn tute nekonatajn al la mondo ĉar ili verkis en la juda lingvo.

**Dektria Universala Kongreso de Esperanto**, Praha 31 Julio—6 Aŭgusto 1921. Esperantista Dokumentaro, kajero 33. Esperantista Centra Oficejo. Prezo 3 fr.

**Internacia Medicina Revuo**. Oficiala organo de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Adreso de la redakcio: D-ro Karlo Mezei, Teréz-körut 4, Budapeŝt VI; de la administracio: Libroeldona Societo "Kultura", Teréz-körut 5, Budapeŝt VI, Hungarujo. Aperos en ĉiuj 5 semajnoj. La enhavo estas vere faka, kaj ni deziras al tiu revuo longan daŭron.

**Karl J. Loy: Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto**. Esperanto-Eldonejo Ellersiek & Borel G.m.b.H., Berlin. 232 paĝ. Kartonita. Prezo 3 sv. fr. La libro aspektas tre bona. La tradukojn ni ne detale rigardis, ĉar tion certe faros germanaskitaj rezencantoj.

**Das Deutsche Lied in Esperanto**. Germanaj kantoj Esperantigitaj. Kompilis Friedrich Pillath. Esperanto-Eldonejo Ellersiek & Borel G.m.b.H., Berlin. Dua, iom kompletigita eldono. 74 paĝ. La enhavo estas inda je pli bona papero. La presado tamen estas zorga.

**Th. Cart: Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto**. Kolekto de la Akademio. Eldonis Esperanto-Eldonejo Ellersiek & Borel G.m.b.H., Berlin. 32 paĝ. kaj kovrilo. Prezo 0:30 sv. fr. Utila libro por kontroli ĉu certa vorto estas vere esperantista aŭ ne. Tri preseroj laŭŝajne ne estus necesaj en tia libro.

**IV-a Internacia Foiro de Reichenberg** 11—19 aŭgusto 1923. Generala vara ekspozicio en 20 grupoj, speciala foiro de bohemiaj porcelanaĵoj ktp, prospekto en esperanto.

**Skänemässan**. La foiro de Skanio, Malmö, Svedujo, 30 julio—5 aŭg. 1923. Prospekto en Esperanto. Gojĝe, ke tiu foiro komencis uzi nian lingvon por reklamo kaj korespondado. Ni esperas, ke la rezultatoj igos ĝin daŭrigi ta uzadon de Esperanto.

**VII. Svisa Specimena Foiro**, Basel 14—24 Aprilo 1923. Ilustrita prospekto en Esperanto.

**Bulteno Germanlanda**. Informilo pri Historio, Politiko kaj Ekonomio. Aperos laŭ neceso. Kolekto de 3 kajeroj kostas 1 sv fr. Germana Esperanto-Servo, Berlin S. 59. 1-a kajero, Majo 1923. 1-a kolekto. Ree oni vidas uzon de Esperanto por praktikaj celoj.

**Edmond Privat: Historio de la lingvo Esperanto**. Deveno kaj komenco 1887—1900. Dua eldono. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Prezo por Svedujo sv. kr. 1:05 Havebla ĉe Eldona Societo Esp.

Tiu libro estas kaj interesa kaj utila, oni nur deziras ke ĝi ne finu tiel frue kiel jam en la jaro 1900. Sed oni havas la rajton esperi, ke nia eminenta samideano Privat skribos daŭrigaĵon. Ni varme rekomendas la libron al ĉiu esperantisto, precipe tamen al tiuj, kiuj intencas fari ekzamenon Esp.

.....



## Från Expeditionen.

Ännu är det många, som ej beställt den nya broschyren "Nationernas förbund om Esperanto såsom internationellt hjälpspråk", Vareda esperantist bör dock äga den och dessutom sprida den till utom vår rörelse stående personer. Priset är 50 öre (i bokhandeln 1 krona).

Medlemskort för lokalföreningarna hålla på att tryckas. De skola tillhandahållas förningarna i block om 50 st.

En del ombud ha ännu icke redovisat för första kvartalet i år. Vi emotse rapport snarast.

När nya föreningar skola bildas ute i landet vore det klokt om vederbörande underställde förslaget om namn förbundsstyrelsens prövning så att icke sammansättningarna *federacio, societo o. s. v.* användes. Den bästa benämningen för en lokalförening är *grupo*. Klubo kan möjligen användas.

De kursledare, som ej insänt uppgifter om vinterns kurser, uppmanas att ej försumma detta. Det är en oertergivlig fordran att vi med tillförlitliga siffror skola kunna visa, huru många personer som studerat esperanto om vi ämna ingiva framställningar till myndigheterna.

## Signoj.

Ĉu ekzistas ankoraŭ iu, kiu ne kredas je la baldaŭa kaj plena venko de Esperanto? Se vi konas tian personon, bonvolu lin konduki al mi por ke mi rapide konvinku lin per miaj plej novaj "konvinkiloj".

Kiajn "konvinkilojn" vi do havas? la leganto demandas.

Jen!

Venante hejmen unutage mi trovis sur la skribotablo rekomenditan leteron el eksterlando. Ĉar mi havas spertojn rilate al rekomenditaj sendaĵoj de esperantistoj mi malfermis ĝin tute sen emocio, sed vidante la enhavon mi estis ravigata: estis prospekto (kaj eĉ lotoj) de granda klasloterio. Kiam venas tiaj prospektoj en sveda aŭ alia lingvo, mi luj forjetas ilin, ĉar por mi estas neeble gajni je loterio, sed tiun ĉi prospekton mi detale studis.

Al dubemaj homoj, kiuj kontraŭdiras vin: "Oni ankoraŭ ne havas ian utilon de Esperanto, ĉar ĝi ne estas praktike uzata", vi povas respondi, ke tio estas malprave ĉar eĉ la grandaj klasloterioj komencis elsendi prospektojn en Esperanto, kaj oni povas per Esperanto gajni "en plej favora okazo" 25,000,000 kronojn.

Pripensu, kiel utila povas esti nia kara lingvo!

H.

**VI PAROLAS** pri centmiloj da Esperantistoj. Pruvu ke estas almenaŭ dekmil. UEA bezonas dekmil membrojn. Aliĝu al UEA!

**La Esperos fortsättningskurs** har icke kunnat beredas plats i detta nr utan kommer att införas i nr 7.

## INGEN esperantist

får underlåta att skaffa sig den nya broschyren

## Nationernas Förbund om Esperanto som internationellt hjälpspråk.

Det viktigaste dokument esperantisterna hittills haft i sina händer. Erhålles mot insändande av 50 öre + porto 5 öre.

Förlagsföreningen Esperanto Stockholm 1.

Sprid denna broschyr bland Edra bekanta!

## Ny litteratur.

**E. Privat:** *Historio de la lingvo Esperanto*. Pris kr. 1:05. En intressant och nyttig bok för varje esperantist.

**W. Lippmann:** *Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten*. Kr. 1:—.

**Ed. About:** *La reĝo de la montoj*. 248 sidor. Pris 4:—.

**E. Privat:** *Esperanto*. Manuel pratique. Lärobok på franska. 2:50.

**Literatura Mondo**. N-ro 5 kun traduko de "La fabelo de Sankta Gothardo" (August Strindberg) farita de s-ro P. Nylén. 0:60.

**Harrison Hill:** *La Fama Humorkanto Esperanto*. En i England mycket uppskattad sång. Noter med text. 0:50.

## Esperanta Librejo

(Papervendejo)

Malmkillnadsgatan 34, Stockholm (apud Hamngatan).

Tel. Norr 119 89.

Faru viziton!

Granda sortimento de esp. literaturo.

## Uzu Esperanton!

Ludvika Boktryckeri 1923

## Alvoko.

Ĉiuj samideanoj en Dalarna, kiuj deziras partopreni en provinca esperantokunsido en Falun, kiun la tieaj samideanoj aranĝos, bonvolu sin anonci al *S:o Gustav Johansson, Slussen 10, Falun*. Via anoncigo estas necesa por ke ni sciu kiom da samideanoj ni povas atendi.

Por KLUBO ESP. DE FALUN:  
La Estraro.

## Parolu esperante!

## Svenska Esperanto Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1

har till uteslutande ändamål det mellanfolkliga hjälpspråkets utbredande och befrämjande.

Årsavgift för fristående medlemmar kr. 5:50 inberäknat prenumerationsavgiften för *La Espero*.

## Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

(Eldona Societo Esperanto s. p. r.)

Adress: Stockholm 1

tillhandahåller all slags esperantolitteratur, utgiver *La Espero*. Prislista och provnummer sändes gratis och franko.

## La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Adress: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1,

utkommer en gång i månaden. Prenumerationspris inom Sverige 3:50. Annonspolis 10 öre pr mm.

## Prenumeration å veckofidningen

## ESPERANTO TRIUMFONTA

mottages av

Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1

Pris 1/1 år 12:— sv. kr., 1/2 år 6:—, 1/4 år 3:—

Prenumeration kan börja när som helst.

Anslut Eder till

## Svenska Esperanto-Förbundet

Stockholm 1

Årsavgift kr. 5:50, däri inberäknat prenumerationsavgiften för *La Espero*.

Insänd årsavgiften snarast möjligt!